Alice Lindel,

# Ŝtupoj de l' vivo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La hom' en la infana aĝ'
ne havas multe ja da saĝ',
kaj volas havi iom pli
da jaroj ol jam havas li.

Kun dekok jaroj pensas li:
„Kun dudek estos aĝa mi. -
Kaj estas tridekjara ul'
hom', kiu estas maljunul'."

Impresas la kvardeko lin,
jam kvazaŭ de la vivo fin'.
Sed kiam havas kvindek li,
forŝovas li la finon pli.

La aĝ' de sesdek jaroj ne
tro alta ŝajnas esti, tre
plorinda tamen ŝajnas la
sepdeka vivojaro ja.

Post okdek restas la esper',
atingi naŭdek sur la Ter'.
Kaj nombras tiam tiu ĉi
la homojn, kiuj aĝas pli.

...

Alice Lindel,

# Stufen des Lebens

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Ĉar vere daŭras cento da
vivjaroj nur malmulte ja
pli longe ol dek; pensas mi:
Per nul' nur diferencas ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Stufen des Lebens" de Alice Lindel en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-03-02.*

*MR-399-1a / Arg-795-1592 (2013-01-23 11:15:31)*

*S-ano Albert Stephan publikigis tiun ĉi Esperantigon de la poemo en la LEA-informilo, en la jaro 2003.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Alice Lindel.*

*Arg-795-1591 (2013-01-23 11:19:03)*

*S-ino Alice Lindel vivis en Gütersloh, Germanio, laŭ informo de s-ro d-ro Thomas Lindel, Memelweg 4/1, D-89168 Niederstotzingen, Tel. 0049-(0)7325-8252.*